starto

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio - Orgán Českého esperantského svazu

Jaro tria N-ro 5 Septembro-Oktobro 1970

# DU GRAVAJ DATREVENOJ

Antaŭ 53 jaroj en Rusujo venkis la unua socialisma revolucio en la mondo. Avangardo de la revolucio, la laborista klaso, estis gvidata de la bolŝevika partio,kiu sola plentaksis la instruon de Marx kaj Engels kaj aplikis ĝin en la cirkonstancoj de la cara Rusujo.Lenin ĝuste priatentis la rusan evoluon kaj por la ideo de la revolucio akiris larĝajn laboristajn kaj kamparanajn tavolojn. La mondo estis konsternita. Firme organizita marksista partio sukcesis ekbruligi flamon de la revolucio en la tuta Rusujo. La relative malforta rusa burĝaro ne kapablis organizite rezisti kaj kontraŭ devizoj de la revolucio: Pacon - panon - teron - liberecon, proponi ion pli altiran. La revolucia Rusujo efikis kiel fajrero por aliaj batalantaj landoj,laboristaj tavoloj en pluaj militantaj landoj iĝis radikalemaj. La plimulto da laboristoj en okcidento estis organizita en social-demokratiaj partioj, kiuj intence bremsis ilian entuziasmon por revolucio kaj sufokadis la evoluon de eventoj je nuraj proklamoj de burĝe demokratiaj postuloj.

Simila evoluo pasis ankaŭ en la plej industria parto de la iama Aŭstrujo-Hungarujo, en Bohemio.Nombraj strikoj, demonstracioj kaj ribeloj de armeaj unuoj prognozis baldaŭan finon de la putriĝinta monarkio. Sub la premo de laboristaj tavoloj la burĝaro formas Nacian Komitaton,kiu estis devinta trankvilmaniere transdoni la potencon de Habsburgoj kaj germanaj kapitalistoj en la manojn de naskiĝanta ĉeĥa grandburĝaro.

Karakteriza esprimo de la popolsopiroj estis okazaĵoj de la 14-a de oktobro 1918 en Praha. Eĥo de la GOSR kaj la unuaj konoj pri la aprilaj tezoj forte impresis la laboristan klason. Socialismo ĉesis esti timigilo. Sed pro la perfido de la social-demokratoj kaj naciaj socialistoj bedaŭrinde estis perdita la ĝusta momento por revolucia transpreno de la ŝtata povo.Revolucia entuziasmo estis lerte transformita je tutnacia ĝojo pro liberiĝo de la patrujo. La 28-a de oktobro tamen ne plenumis la dezirojn de la laboruloj pri efektiva demokratio kaj estis bezonaj ankoraŭ multaj batoloj por la demokratio socialisma.La iniciatinto de tiuj ĉi batoloj estis juna politika partio de nova tipo -Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio.

Hodiaŭ al la dato de la 28-a de oktobro ligiĝas ankoraŭ aliaj historie gravaj okazaĵoj - la naciiĝo de la ĉefaj produktadrimedoj kaj fina aranĝo de samrajtaj interrilatoj de niaj popoloj - federaciiĝo. Per tio oni atingas novan enhavon de tiu ĉi historia tago, la firmiĝon de la frata ligo de ĉeĥoj kaj slovakoj sur ilia vojo al socialismo.

Josef Vítek

## ZE ŽIVOTA KROUŽKŮ

BUČOVICE - U příležitosti prvního výročí EK Bučovice sešlo se zde 31. srpna 26 esperantistů z pěti klubů a kroužků:Brna, Bučovic, Kyjova, Slavkova a Vyškova. Cílem setkání bylo dobře připravit podzimní činnost ve zmíněných klubech. Přítomní vyjádřili přání organizovat podobná setkání i v dalších místech.

NOVÝ BOR - Slavnostní zahájení výstavy "Esperantem za mír " se konalo 9. září v zasedací síni MěNV v N.Boru u Tachova.

PLZEŇ - EK při závodním klubu Škoda se sešel 30.září za účasti 25 členů. Delší přestávku v klubovém životě způsobila přestavba místnosti " Svazáček ". Kroužek se nyní schází pravidelně každý týden ve čtvrtek v 19 hod.

PRAHA - Moderní metodou INTER vede esp. kursy od 6.října v ZDŠ Sázavská 6 A.Slanina. Vyučování je každé úterý od 18 do 20 hod.

---

Nezbývá než zakončit tuto bilanci otázkou:cožpak se v našich kroužcích nestalo za minulé měsíce opravdu nic zajímavého?? Či snad zprávy přijdou až za několik měsíců,jak se to často bohužel stává? / A přitom by stačily někdy tři-čtyři řádky nebo obrázek/. Napříště již na podobná opoždění nemůžeme brát zřetel!Žádáme však funkcionáře,aby se nad tímto nedostatkem zamysleli, aby rubrika "Ze života kroužků" byla co nejobsažnější a aby se stala skutečným zdrojem informací nejen o " nás ", ale i o těch " druhých ".

/red/

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa E-Asocio-vydává Český esperantský svaz, Praha 2,Blanická 4,aperas dumonate - vychází každý druhý měsíc,rediguje - redaktas O.Knichal kun red. komitato - s red.radou:Ing.E.Felix,J.Mařík a Ing.F.Sviták.

## OSOBNÍ KRONIKA

Ve vynikajícím tělesném a duševním zdraví se dožil 11. října svých d e v a d e s á t i n pan Antonín V a l o u š e k z Brna.

V červnu t.roku zemřel Ondřej K a j f o z s z Nýdku - v září František S k u l i n a z Bocanovic / Jablunkov / a Ing. Pavel B l a h u t z Třince - všichni členové EK v Třinci.

## Dvakrát počtvrté

V Jablonci n.Nisou se již počtvrté sešli esperantisté/celkem 127/z ČSSR, Polska, NDR, Rakouska na mírovém setkání - ve dnech 11.-13. září. Na ještědské Pláni se zúčastnili odhalení památníku připomínajícího 100. výročí českoněmeckého tábora lidu.
V kultur. programu na Malé scéně přivítal esperantisty předseda školské a kulturní komise MěNV a ředitel KaSS.
V příštím roce by pořadatelé chtěli uspořádat setkání během mezinárodní výstavy bižuterie.

---

V Mělníku uspořádá 8. listopadu zdejší EK ZDŠ, Jungmannovy sady, 4. setkání za účasti drážďanských přátel.
Z programu zaznamenáváme návštěvu pamětihodností Roudnice n. Labem a výstup na horu Říp.

## N E P Ř E H L É D N Ě T E !

Svaz má unikátní možnost vydávat ve spolupráci s HEROLDO de ESPERANTO esp.publikace /m.j. se chystá kompletní vydání Švejka/. Vše závisí na tom, zda se najde tiskárna ochotná text vysadit a případně i vytisknout.Při event. jednání s tiskárnou je třeba zdůraznit, že část nákladu představuje přímý vývoz přes Artii, tudíž i devizový přínos.
Žádáme všechny pracovníky buď v polygrafickém průmyslu a nebo jejich známé o pomoc. Každý tip může být důležitý.

# BLINDULA FESTO EN PRAHA

La Ĉeĥa Ligo de Nevidantoj kaj Malfortevidulоj organizis renkontiĝon de ĉeĥaj nevidantaj kaj malfortevidaj esperantistoj okaze de la 50a datreveno de la fondo de "AŬRORO". La kunveno okazis la 20an de junio en Praha. Ĝi havis aspekton de landa kongreso, ĉar partoprenis ĝin 60 gesamideanoj el 19 lokoj, krome delegitoj de la Slovaka Ligo el urboj Bratislava kaj Levoča.

Kiel samideanaj gastoj venis 14 membroj de la Esperantista Klubo en Praha. La konferencon honoris per sia ĉeesto vicprezidanto de la Ĉeĥa Ligo de Nevidantoj kaj Malfortevidulоj, s-ano Rudolf Krchňák, la prezidanto de ĈEA kaj ĈSEF, Josef Vítek, la ĉefsekretario de la jam nomita Ligo, s-ro Oskar Bohata kaj same la ĉefredaktoroj de la centraj blinduloorganoj: la ĉeĥa "Zora", d-ro Zdeněk Šarbach, kaj la slovaka "Nový Život", s-ro Uhriniak, kaj la direktorino de la Centra Blindul-Biblioteko, s-ino Prášilová.

La ĉefa celo de la renkontiĝo estis pridiskuti renovigon de l' E-movado inter la blinduloj kaj ilian interesigon pri E-laboro.

La unuan parolon ricevis s-ano Vítek. Li skizis la nunan aspekton de la E-laboro en nia lando kaj ankaŭ organizeblon de la blindaj esperantistoj en ĈEA, kiu starigis sekcion, en kiu povas grupiĝi la nevidantoj kun siaj specialaj interesoj kaj labormetodo, pagante modifitan membrokotizon de Kčs 10,- jare. En tiu ĉi malaltigita kotizo ne figuras la abonpago por "Starto"; la nevidantaj membroj de ĈEA legos anstataŭ ĝi "Aŭroron", kiu enhavos la asociajn informojn. Oni antaŭvidas formiĝon de loka ER en Praha ĉe la kulturfako de la Ĉeĥa Ligo de Nevidantoj.

Sekvis skizo pri la historio de la E-movado inter la blinduloj ĝenerale kaj pri la ĉeĥoslovaka partopreno en ĝi speciale. Parolis Vuk Echtner.

S-ano Krchňák skizis la perspektivojn pri la plua evoluo kaj vokis al diskuto. Ekparolis malnovaj E-pioniroj, s-roj Krejča, Škoda, s-inoj Bárochová, Prášilová, Rabanová, Sonnleitnerová, Zoulová k.a. Ĉiuj aprezis la utilon, kiun E-scio donis al ili. Parolis la slovakaj delegitoj kaj Blindulkongresano el 1969, s-ano Lhoták. Tiu ĉi programparto tute decide influis la kunvenintaron kaj la rezulton de la renkontiĝo. S-ano Echtner informis pri novaj aliĝoj al la Skriba E-kurso al la blindula sekcio ĉe ĈEA kaj abonpagoj de "AŬRORO". Li vokis al kunlaboro en la gvidado de la sekcio. La formiĝanta situacio estas vere esperiga kaj oni certe povos baldaŭ raporti pri konkretaĵoj.

La kora amika kunesto restos por longe en agrabla memoro de ĉiuj. Ankaŭ la vidantaj amikoj ĝoje raportis pri ĝi en siaj klubaj kunvenoj.

---

## Intenzivněji na SET 1971

**Letos se v Lančově osvědčil intenzivní kurs esperanta, při němž byla úspěšně probrána celá učebnice "ABC" T. Kiliána. Pořadatelé by proto rádi tento způsob výuky rozšířili. Začátečníci, kteří se příštím rokem chystají do Lančova, se mohou přihlásit do konce listopadu na adrese: F. Sedláček, Hartvíkovice 142, okr. Třebíč.**

**V přihlášce uveďte, zda máte učebnici "ABC" ( případně zda ji chcete zaslat ) a přiložte známkovanou obálku s vaší přesnou adresou. Kurs je určen účastníkům nad 15 let.**

**Doufáme, že kroužky pomohou i při výběru posluchčů.**

**F.S.**

## Fervojista RIMINI

Itala urbo Rimini gastigis en majo 701 esperantistajn fervojistojn, kiuj alvenis el diversaj landoj por partopreni la 22-an kongreson de Internacia Fervojista Esperanto Federacio. IFEF unuigas entute 3ooo samprofesiulojn el dudek landoj de Oriento kaj Okcidento. La ĉs. sekcion de IFEF, en kiun eniras nun 130 pagantaj membroj, reprezentis en Rimini Jiří Pištora el Česká Třebová.

Dum la lasta plenkunsido de l´ KONGRESO estis akceptita propono realigi postvenontan, 24-an kongreson de IFEF, en Praha /1972/.

J.P.

## Esperanto penetras sovetan lernejon.

La klerigministerio de la balta soveta respubliko Estonujo anoncis, ke la internacian lingvon Esperanto, enkondukitan kiel fakultativan temon lastjare en parton de la estonaj lernejoj dume po unu horo ĉiusemajne, oni instruos jam en la nova lerneja jaro dum po du horoj semajne.

## Kvar modernaj kanzonoj

en plenumo de la esperantista ensemblo "Muzilo" el Vroclavo ĵus aperis. La mikrokanela disko estas aĉetebla ankaŭ en Pola Kulturcentro, Praha 1, Jindřišská 3.

## Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

havebla. Ĝis proksimume oktobro oni dissendas la vortaron, sed nur al antaŭeldonaj mendintoj, poste oni povos plenumi novajn mendojn. Mendemaj bibliotekoj kaj unuopuloj sin turnu al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. La kosto 25 US dol. -1344 paĝoj.

**Giai Phong - eldonejo** aperigis ĉijare du gravajn politikajn dokumentojn en la internacia lingvo. Temas pri "La dekpunkta totala solvo de la nacia fronto de liberigo de Sudvjetnamio al sudvjetnama problemo" kaj "Agadprogramo de la provizora revolucia registaro de Sudvjetnama respubliko."

## Korespondi dezíras

ESTONA SSR - Selma Redel, 55j., Tartu, Tähtvere 18c 5.

HUNGARIO - kun gesamideanoj el Ĉeĥoslovakio: Molnár Attila, 22j., Kiskunfélegyhaza, Klapka u-40. o Potyesz Istvan, 23j. Kiskunfélegyhaza Just Gy u-4. o Hevér Gáspár, 36j., instruisto, Jászszentlászló, ált. iskola. o Horti Sándor, 35j., instruisto, Tanár. Tiszaujfalu, ált. iskola. o Lantos Katalin, 21j. instruistino de geografio, Eszperanto kl. Kiskunfélegyhaza, Szakmaközi Müv. Ház., Szabadság Tér.

ITALIO - Giuseppe Lo Presti Via Berthollet 40, 10125, Torino

JAPANIO - f-ino Kazuko Takeda, 20j., Denentyohu 5-23-4, Ota-ku-ku, Tokio. Kun gejunuloj pri div. temoj.

POLLANDO - Lidia Chonacka, Os. Wandy 25/24, Nowa Huta 28, Krakow, Pollando. o Odaria Danuta Babkin, Aleja Slowackiego 37/12, Krakow 9, Pollando, studentino de germana filologio. o Jozef Roman Maksimiak, Ciechomice, P-TA Wrzaca pow. Supsk, wojvod. Koszalin.

RUMANIO - Weiss Astrid, 22j. str. Republici 144 Rupea - Brasov. o Gugiu Puica, 34j., Humulesti, Piatra Neamt. o E-kurso ĉe Politeknika Instituto/Tudor Ŝtefan, spl. Independentei- 208, bl. B, Bucuresti - sect. 7.

# Okénko do sekretariátu

Jak jsme již v minulém čísle oznámili, nastoupila do sekretariátu svazu nová pracovnice. Vzhledem k tomu byly předsednictvem určeny úřední hodiny pro veřejnost. Potřebujete-li vyřídit nutnou záležitost mimo úřední hodiny, oznamte nám svoji návštěvu předem telefonicky nebo písemně.

Úřední hodiny: pondělí a středa 10.00 - 17.00 hod.
úterý, čtvrtek a pátek 10.00 - 13.00 hod.

Žádáme opět všechny funkcionáře EK, aby provedli u svých členů kontrolu, zda mají zaplaceny členské příspěvky na letošní rok. Do 5. října 1970 nesplnilo svoji členskou povinnost ještě 220 loňských členů.

Podporující členové ČES v roce 1970 (pokrač.): B. Metznerová, Fr. Patera, J. Hubinská a J. Trávníčková.

DARY NA EDIČNÍ FOND ČES (pokrač.): M.T. Bourbeau - 320.-, V. Lorenz - 50.-. B. Novák - 6.-, Š. Held - 24.-, O. Nesnídal - 12.-, ing. L. Krajíc - 150.-, A. Pokorný - 10.-, D. Bartošík - 16.-, J. Morávek - 50.-, V. Šťastný - 35.-, J. Vodica - 20.-, Z. Nekudová - 20.-, J. Kropáček - 10.-, E. Kursová - 10.-, EK Stonava - 180.-, E. Pidra - 10.-, M. Rucká - 50.-, A. Vojtová - 46.-, EK Litomyšl - 40.-, J. Vykoukalová - 15.-, M. Pospíšilová - 10.-, V. Heřmanská - 12.- J. Mach - 12.-, J. Fabíková - 5.-, EK Přerov - 14.-, (sa 12.316.- Kčs).
Děkujeme všem dárcům, kteří svou obětavostí přispěli k vydání knihy Karla Čapka „Libro de apokrifoj".

Pořadí EK podle počtu řádně přihlášených členů, kteří mají zaplaceny členské příspěvky na rok 1970 (stav k 5. 10. 1970): Praha - 200, VŽKG - 86, Brno - 82, Třebíč - 80, Mělník - 65, Paskov - 63, Vsetín - 60, Pardubice - 42, Olomouc - 39, Č. Budějovice - 38, Třinec - 35, Plzeň - 34, Tábor - 33, Č. Třebová - 32, Kopřivnice - 31, Ústí n/L. - 28, Žďár n/S. - 28, Hr. Králové - 26, Písek - 25, Poruba - 25, Opava - 23, Jablonec n/N. - 22, Hranice - 20, Liberec, Poděbrady, Polička a Svitavy - 19, Kolín - 18, Náchod, Gottwaldov a Stonava - 17, Bor, Litoměřice - 16, Havířov a Havl. Brod - 14, Bučovice, Brno I.B., Frýdek Místek, Jihlava DK, Kyjov a Příbor - 12, Hořice a Most - 11, K. Vary, Ostrava železn., Příbram, Turnov a Vyškov - 10, Hodonín - 9, Miletín, Přerov, Šumperk a Teplice v Č. - 8, Kladno, Skuteč a Trutnov - 7, Č. Lípa, Semily, Choceň, Kladno, Králíky, Lanškroun, Žamberk - 6, Bruntál, Č. Třebová ( SPŠŽ ), Frýdlant n/Ostr., Litomyšl, Městec Králové, Mor. Budějovice, Ostrov n/O. a Slavkov - 5.

Žádáme kroužky, aby nám oznámily, zda naše údaje o počtu členů odpovídají skutečnosti. Rovněž ať hlásí veškeré změny /přestěhování, úmrtí a pod./.



En la kastela ĉirkaŭaĵo de Hradec apud Opava oni povas trovi diversajn angulojn por amuzo kaj ripozo. Romantika pejzaĝo de tiu ĉi loko estis taŭga kuliso por la II-a Esperantista Kultura Festivalo okazinta antaŭ kvar monatoj.

foto O. Knichal

# INTERHELPO – GLORA PAĜO DE ĈEĤOSLOVAKA HISTORIO

En la ĵurnalo "Kinoekranoj de Riga" antaŭnelonge estis publikita informo pri "Interhelpo", nova verko de kirgiziaj filmistoj. Jen unu el ties alineoj:

"...Interhelpo estas la internacia helpo. Tiel estis nomita la industria kooperativo kreita antaŭ 45 jaroj en Ĉeĥoslovakio. La 23an de marto 1925 el urbo Žilina forveturis al la fora Kirgizio la trajno kun unuaj interhelpanoj, 980 ĉs. gelaboruloj."

Moskva E-veterano, N.F.Danovskij, aldonis kelkajn precizigojn al la menciita artikoleto: "Interhelpo estas Esperanta vorto. Estas interese, ke la plejmulto da unuaj interhelpanoj estis esperantistoj, inter ili ankaŭ Julius Fučík," asertas Danovskij. Li rememoras, ke pri la kooperativo "Interhelpo" li unuafoje legis en 1925 en la sovetia Esperanto-revuo. Pli poste pri "Interhelpo" raportis Pravda kaj Komsomolskaja Pravda. Ili konstatis: "Interhelpo prezentas mirindan paĝon en la historio de la unua socialisma ŝtato kaj gloran paĝon de la ĉeĥoslovaka historio."

Prezidanto de la kooperativo, kiu grupigis reprezentantojn el 14landoj, estis dum du elektaj periodoj J. Fučík. En 1933 li skribis: "Min precipe ĝojigas la fakto, ke Interhelpo ĉesis esti ĉeĥoslovaka insulo en la sovetia oceano. Ĝi kunfandiĝis kun sovetia vivo, enradikiĝis en ĝin...."

La unika nomo "Interhelpo" restos por ĉiam en la historio de la amikeco inter du popoloj kaj en la historio de Esperanto-movado.

laŭ J.Gold

---

56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Londono 31.7. - 7.8.1971

Kvarpaĝa, grandformata, ilustrita Unua Bulteno kaj samtempe aliĝilo por UK estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe kongresaj perantoj, ĉe la landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj de UEA.

Konstanta adreso de la 56-a UK: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

---

Tutŝtata E-konferenco en GDR

En urbo Karl-Marx-Stadt okazis fine de septembro /26.-27.9./ la unua tutŝtata Esperanto-konferenco de delegitoj, kiuj reprezentis proksimume 2000 organizitajn esperantistojn en la Germana demokratia respubliko. Okazis du komunaj kunsidoj de la delegitoj, kiuj germanlingve traktis la ĝis nun atingitajn rezultojn kaj aprobis unuanime programon por la nova labor-periodo. En Karl-Marx-Stadt ĉeestis ankaŭ kvar ĉeĥaj esperantistoj.

La konferenco estis riĉigita per kultura programo, en kiu tre sukcese prezentis sin s-ano Miroslav Smyčka, baritono de la ŝtata teatro en Ústí nad Labem.

Novobilský

---

„Jan Amos Komenský" Magnetofona programo pri la vivo kaj agado de la granda ĉeĥo. Speciala atento estas dediĉita al liaj pensoj traktantaj universalan lingvon.

„Poeto Jiří Kořínek" Programo pri la pensoj, laboro kaj vivo de la konata poeto. La programo estas kompletigita per orig. kaj trad. poemoj, fragmentoj el Manon Lescaut kaj operarioj en E.

Interesatoj bv. por kopiado sendi sian magn. bendon /por unuhora daŭro/ kaj 8.- Kčs al D-ro Vlast. Novobilský, Školní 5, Ústí nad Labem.

---

## PAŜOJ AL PLENA POSEDO

progresiga antologia lernolibro de W. Auld, Akademiano. Eldonas:
Ĉeĥa Esperanto-Asocio
kaj
Heroldo de Esperanto.

Tuj antaŭmendu kaj samtempe pagu speciale rabatitan prezon 17.- Kčs al la konto de ĈEA: 02-4632-7 SBČS Praha 2.

---

KOMUNAN PROTESTAN REZOLUCION kontraŭ imperiisma agreso de Usono en Sudvjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo sendis al la usona ambasadejo en Praha Ĉeĥa E-Asocio kaj ĉeĥa sekcio de MEM.

Karel K r a f t

## ĈU ĈEĤE AŬ ,VERDE"?

"Kara amiko,ĉu vi estas ĉeĥo? Do, kial vi mistifikas min?" diris post mallonga prezentigo "verdstelulo", kiun mi renkontis surstrate."Vi ja sur portas la verdan stelon same kiel mi, do mi alparolis vin Esperante",daŭrigis mi jam ĉeĥe nian interparolon. Por esti sincera,li posedis verdan stelon,sed ne la "verdan" lingvon. Kompreneble li tial kontraŭstaris interparolon en tiu ĉi lingvo.

Iom malpli komprenebla estas tia kontraŭstaro ĉe eminen tuloj. Ili opinias tian uzon nenatura,perforta, stranga. Mi mem vidas nenion nenaturan en uzo de iu ajn lingvo celanta komunikon de ideoj.Mi obeas al regulo pri neceso kaj sufiĉo, kaj - ĝentileco : al ĉeĥo, kiu min alparolas ĉeĥe, mi respondas ĉeĥe, al ĉeĥo, kiu min alparolas Esperante, mi provas respondi Esperante. Ceĥon, kiu min alparolas ekzemple rumane, mi insultas /ĉar kiu scias, ĉu li ne insultas min?!/.

Se mi estas en bona humoro, mi inklinas al Esperanto kaj en parolaj kaj en skribaj kontaktoj. Unua kialo: ekzistrajto de Esperanto. Anstataŭ longe eksplikadi pravecon de ĝia ekzistrajto mi resumus koncize: mi ŝatas la ideon, mi ŝatas la lingvon. Dua kialo: rajto de l' libervola uzo.Se ni konsideras ĉiujn lingvojn egalrajtajn,tiam ni ne povas rifuzi la saman rajton ankaŭ al Esperanto. Kaj ĉar tiu ĉi lingvo evoluis ofte en naciaj sferoj, ĝia uzo tiurilate estas natura.Mia persona sperto ne estas verŝajne escepta: se mi limigus uzadon de Esperanto al internacia skalo, mi restus eterna balbutanto, ĉar eksterlandanon mi iam nerenkontas dum la tuta jaro.Kaj se mankas al mi eĉ la persona kontakto, ĉu la skribo ne povas anstataŭi ĝin?

Kelkaj miaj amikoj montris al mi mirindan ekzemplon de lingvaj toleremo kaj egalrajteco.En iliajn leterojn skribitajn en unu lingvo enŝoviĝis frazo aŭ alineo en la alia lingvo. Plej ofte pro nesufiĉa koncentrigo, /ekzemple ili daŭrigis siajn leterojn post interrompo/.

Mi ne estas denaska esperantisto kaj neniam atingos la saman nivelon en Esperanto kiel en mia gepatra lingvo. Se mi transiros al la ĉeĥa,kara amiko, estu singarda : aŭ mi estas malbonhumora kaj ne povas koncentriĝi aŭ mi fariĝas pigra.

---

Valora donaco por Via korespondanto:

**LIBRO DE APOKRIFOJ**

de la mondfama verkisto Karel Čapek.Spritaj rakontoj el pasinteco kun aktuala senco.

**Tradukis** Josef Vondroušek **kun lingva** konsultiĝo de Rud. **Hromada,** T.Pumpr kaj R.Rosetti. Eldonis: **Ceĥa Esperanto-Asocio en Praha. La libro estas depresaĵo el la literatura aldono de la gazeto PACO - 1969.La prezo 12,-Kčs,105 paĝoj,** kartonita.

Mendante minimume dek ekzemplerojn oni ricevas rabaton po unu krono,por dudek aŭ pli jam po du kronoj.

Ricevitaj periodaĵoj.PACO/eldonoj de GDR kaj Vjetnamio/• Interlingvistika Informa Servo, n-ro 3 • Svisa Espero,n-ro 8 • Geonkloj Esperantistaj, n-ro 19 • Zprávy Klubu esperantistů v Praze,n-ro 3-4 • Bulteno de EK Brno n-ro 4/90 • Franca Esperantisto n-ro 261 • Esperanta Finnlando, n-ro 6 • Esperanto Gazeto, n-ro 42 • Kvakera Esperantisto, n-ro 66 • Bulgara Esperantisto, n-ro 7 • Interligilo 1970 •

# *František Omelka:* LA GRANDA ADMIRALO

Aventura romano „La Granda Admiralo" de F. Omelka - la aŭtoro de la fama „Alaska Stafeto" mortinta antaŭ dek jaroj - ĉerpas el la vivo de la mondkonata vojaĝanto F. Magalhaes. Sube unuafoje aperas parto el ĝi.

---

Lukto daŭris jam sufiĉe longe. Francisko elĉerpiĝis. Grandaj ŝvitgutoj defluis sur lia vizaĝo. Liaj batoj fariĝis malpli rapidaj kaj malpli fortaj. Fernao rimarkis la senpovon de Francisko kaj antaŭvidis, kiamaniere ĉio finiĝos. Kaj li mem devas observi ĉi tiun senesperan lukton kiel apatia rigardanto, ĉar la aglo ĉiujn ŝtonojn lerte evitas. Subite li ekkriis:

„Francisko, persistu ankoraŭ momenton! Persistu!

Kaj tuj poste li vokis al knaboj sub la kastelo:

„Diego, venu rapide supren! Sed rapide! Rapide!"

Post kelkaj mallongaj - kaj tamen iom longaj! - momentoj estis Diego apud la frato.

„Donu al mi ŝnuregon!", diris Fernao.

„Jen ĝi estas."

Diego disvolvis ŝnuregon, kiun li havis volvitan ĉirkaŭ talio kaj donis ĝin al Fernao. Tiu faris el ĝi banton, firmigis ĝin ĉirkaŭ granda ŝtonego, la liberan ŝnuron volvis ĉirkaŭ sia talio kaj ordonis al Diego:

„Gardu la banton, ke ĝi ne elglitu!"

Fernao malsupreniĝis. Kiam la aglo ekvidis lin, ĝi flugis iomete for de la roko kaj momenton ĝi ŝajnis mediti, kontraŭ kiu el la malamikoj ĵeti sin. Post du-tri sekundoj ĝi kun nova rapideco ekatakis denove Franciskon. La malfortigita knabo svingis per mano por defendi sin, sed li tuŝetis per la glaveto nur unu flugilon, ĉar lia mano jam estis tro malforta. Eta puŝo sufiĉis - kaj la glaveto elmaniĝis.

La knaboj malsupre elkriis pro teruro.

Aglo triumfe grakis kaj faris lastan atakon. Nun ĝi celdirektis al la kapo de malfeliĉa knabo. Francisko instinkte levis manon por ŝirmi la verton. La aglo enhakis fortan bekegon en lian surtuton, sed ĝi restis enigita en leda borderaĵo de la maniko. Ĝi komencis fortege skui per la neatendita malhelpaĵo.

Sed jam estis ĉi tie Fernao. En la momento, kiam la aglo liberiĝis, li trafis ĝin per mortiga bato en la bruston. Rabobirdo renversiĝis kaj falis sub la ruinojn. Ĝi falis inter knabojn, kiuj diskuriskvazaŭ iu pavus kontraŭ ili.

Fernao trovis apogon por piedoj, malfirmigis ŝnuregon kaj alligis ĝin al la talio de malfortigita Francisko.

„Kaj vi?" demandis lacige la savita knabo.

„Mi suprengrimpos unue sola, sen ŝnurego, kaj poste mi suprentiros Vin. Diego atentu!"

„Jes!"

Fernao grimpis supren. Subite aŭdiĝis angorplena krio de Francisko. La ŝnurego streĉiĝis. Fernao rigardis malsupren. Franciskon jam forlasis lastaj fortoj. La mano, per kiu li firme tenis sin ĉe roko, sinkis. Lia senforta korpo libere balancis super la abismo. Post nelonge Fernao estis supre. Helpe de Diego li tiris Franciskon al si.

Francisko estis elĉerpita per la lukto kaj ekscito. Kiam li iomete trankviliĝis, li rigardis Fernaon. Io profunda kuŝis en liaj okuloj, kiam li diris:

„Fernao ... ni estu amikoj!"

„Kion do! Ĉu vi opinias, ke mi ludus kun vi, se vi ne estus mia amiko?"

Tiam eksonis el malsupre ĝojigaj krioj:

„Aglo estas morta! - Ĝi jam ne moviĝas! - Vivu Fernao!"

---